



Imprensa Nacional
Biblioteca Machado de Assis



B0015857

F

408.92

C749

ITO

Plinofindaj datoj kaj faktoj

MEMORGAJO DE LA

9^a Brazila Kongreso de Esperanto

O ESPERANTO

no BRASIL

Datas e fatos mais notáveis

LEMBRANÇA DO

9^o Congresso Brasileiro de Esperanto

NOVEMBRO 1936

IMPRESA NACIONAL — 1936

F 499.992

C749e

ESPERANTO

en BRAZIL

Plinotindaj datoj kaj faktoj

MEMORIGAĴO DE LA

9^a Brazila Kongreso de Esperanto

O ESPERANTO

no BRASIL

Datas e fatos mais notáveis

LEMBRANÇA DO

9^o Congresso Brasileiro de Esperanto

NOVEMBRO 1936

RIO DE JANEIRO — IMPRENSA NACIONAL — 1936

F 499.992
C 7492

20017857

Memorigaĵo de la 9^a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta ĉe la salonoj de paroladoj kaj de la Biblioteko de la Palaco de Itamaratí (Ministrejo por Eksterlandaj Aferoj), dum la monato Novembro 1936, sub la alta patronado de Lia Moŝto d-ro Getulio Vargas, Prezidanto de la Respubliko, kaj honora prezidanteco de s-roj d-ro Antonio Carlos de Andrada, Prezidanto de la Deputitara Ĉambro; d-ro Macedo Soares, Ministro por Eksterlandaj Aferoj; d-ro Marques dos Reis, Ministro de Publikaj Laboroj; d-ro Gustavo Capanema, Ministro de Edukado, kaj kanoniko Olympio de Mello, Ĉefurbestro de la Federacia Distrikto.

DEPARTAMENTO DE IMPRENSA NACIONAL	
BIBLIOTECA	
NUM.	DATA
F363	29/7/64

ESPERANTO EN BRAZILO

Plinotindaj datoj

15 Aprilo 1898 — Artikolo pri Esperanto de Medeiros e Albuquerque aperinta en "Revista Brasileira".

Marto 1904 — Apero de la portugala traduko de la gramatiko "Esperanto en 10 lecionoj", de prof. Th. Cart, farita de s-ro A. Caetano Coutinho.

17 Marto 1906 — Fondo de Grupo Esperantista "Verda Stelaro" en Campinas, Ŝtato São-Paulo, la unua fondita en Brazilo.

21 Majo 1906 — Unua leciono de Esperanto donita de prof. E. Bakheuser per la ĵurnalo "O Paiz".

29 Junio 1906 — Fondo, en Rio-de-Janeiro, de Brazila Klubo "Esperanto", ankoraŭ vivanta kaj la pej agema en Brazilo.

14 Novembro 1906 — La ministro de Publikaj Laboroj d-ro Lauro Müller konsideris Esperanton "lingvo klara" por la telegrafado en Brazilo.

13 Julio 1907 — Malfermo de la Unua Brazila Kongreso de Esperanto, kies malferma kunsido estis prezidita de la ministro de Internaj Aferoj.

21 Julio 1907 — Fondo de Brazila Ligo Esperantista.

Julio 1908 — La registaro de Brazilo je la unua fojo sendis reprezentonton al iu Universala Kongreso de Esperanto.

Septembro 1908 — La Ĝenerala Statistiko-Direkcio eldonis la Bultenon Memorigan pri la Nacia Ekspozicio, kun titoloj en la lingvoj portugala, franca kaj Esperanto, krom aparta antaŭparolo en la helpa lingvo.

Novembro 1908 — Brazila Klubo "Esperanto" ricevis ormedalon pro sia montrejo de Esperantaĵoj ĉe la Nacia Ekspozicio.

Ĝugusto 1909 — La 4-a Latinidamerika Kongreso aprobis deziresprimon je simpatio al Esperanto.

La Unua Brazila Kongreso de Geografio aprobis deziresprimon je aplaŭdoj al la propagando de Esperanto.

5 Oktobro 1913 — Inaŭguro de strato "Esperanto" en Realengo, ĉirkaŭurbo de Rio-de-Janeiro.

29 Oktobro 1913 — Leĝo n-ro 1162 permesanta nedevigan instruadon de Esperanto en lernejoj de Ŝtato Rio-de-Janeiro.

18 Septembro 1915 — La 4-a Brazila Kongreso de Geografio aprobis deziresprimon je simpatio al Esperanto.

Septembro 1916 — Similan deziresprimon aprobis la 5-a Brazila Kongreso de Geografio.

31 Oktobro 1917 — Laŭ dekreto n-ro 1165, strato Maria José, en Rio-de-Janeiro, estas de tiam nomata "Zamenhof"

31 Oktobro 1918 — Leĝo n-ro 759 permesanta la nedevigan instruadon de Esperanto en la Normala kaj duagrada lernejoj en Ŝtato Sergipe.

11 Januaro 1919 — Dekreto n-ro 2083 permesanta nedevigan instruadon de Esperanto en la unuagrada, metiaj kaj Normala lernejoj en la Federacia Distrikto.

Septembro 1919 — La 6-a Brazila Kongreso de Geografio aprobis deziresprimon je simpatio al Esperanto kaj konsilis la tradukadon, en Esperanton, de verkoj de brazilaj aŭtoroj.

10 Aŭgusto 1921 — Brazila Ligo Esperantista sendis al la Ligo de Nacioj alpeton por Esperanto subskribitan de pli ol 200 eminentuloj loĝantaj en Rio-de-Janeiro.

26 Oktobro 1921 — Laŭ dekreto n-ro 4356 Brazila Ligo Esperantista estas konsiderata "societo de publika utileco".

31 Decembro 1921 — La Brazila Parlamento voĉdonis jaran subvencion al Brazila Ligo Esperantista.

4 Februaro 1922 — La ministro de Publikaj Laboroj rekomendis al la direktoroj de l' Poŝto kaj de l' Telegrafo, ke ili sendu al la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista liston de la nomoj kaj adresoj de ĉiuj oficistoj, kiuj jam scias Esperanton, ĝin lernas aŭ estas al ĝi simpatiaj.

Oktobro 1922 — La Unua Kongreso de la Komercaj Asocioj de Brazilo aprobis deziresprimon, per kiu estas konsilita la lernado de Esperanto ĉe la Komerco-lernejoj kaj la uzado de tiu lingvo en la komercaj interrilatoj kun la fremdlandaj komerco-ĉambroj.

La 2-a Amerika Kongreso de Ekonomia Disvastigo kaj Komerca Instruado aprobis deziresprimon pruvantan la neceson esti enkondukata Esperanto en la programojn de la komerca instruado en la landoj de Latinida Ameriko.

28 Decembro 1922 — La Ĉambro de Deputitoj aprobis projekton, kiu permesas ekzamenon de Esperanto en Gimnazio Pedro II kaj en ĉiuj lernejoj, kie okazas ekzamenoj de preparaj objektoj.

Estas aprobita de la magistrato, en unua diskutado, leĝa projekto, laŭ kiu estas rigardata kiel unu el la meritkondiĉoj por la rangaltigo ĉe la urba instruistaro de Rio-de-Janeiro la instruado, almenaŭ dum unu jaro, de la lingvo Esperanto.

19 Aprilo 1923 — La Prezidanto de la Respubliko sendis oficialan reprezentanton al la solena malferma kunsido de la 7-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la ministro de Internaj Aferoj ĝin prezidis.

Majo 1924 — La unua Brazila Kongreso de Kontoscienco aprobis deziresprimon, per kiu estas konsilita la enkonduko de Esperanto en la komercajn kursojn.

24 *Marto 1925* — Enkonduko de Esperanto kiel deviga objekto en la programon de la komerca kurso de Asocio de Komercoficistoj en Rio-de-Janeiro.

Novembro 1926 — La Federacia Registaro pagis ĉiujn vojaĝelspezojn de 1' anoj de la 8-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la Registaro de Ŝtato Espírito-Santo akceptis tiujn kongresanojn kiel ŝtatajn gastojn.

Novembro 1928 — La Dua Nacia Konferenco pri Edukado aprobis deziresprimon favoran al Esperanto.

30 *Junio 1930* — Presentado, ĉe "Cinema Capitólio", de la unua filmo parolata en Esperanto.

17 *Septembro 1930* — La 3-a Sudamerika Kongreso de Turismo, okazinta en Rio-de-Janeiro, rekomendis la publikigon ankaŭ en Esperanto, de propagandaj gvidlibroj.

30 *Januaro 1932* — La Magistrato de Aracajú (Ŝtato Sergipe) donis la nomon "Esperanto" al unu el la urbestroj.

Julio 1933 — La "Touring Club do Brasil" eldonis ilustritan gvidlibron pri Rio-de-Janeiro kun kelkaj paĝoj en Esperanto.

La Societo de Geografio de Rio-de-Janeiro komencis publikigi Esperanto-resumojn de ĉiuj artikoloj de sia Bulteno.

Oktobero 1933 — La Departemento de Poŝto kaj Telegrafo eldonis serion de 20 ilustritaj poŝtkartoj kun vortoj en la portugala lingvo kaj en Esperanto.

Februaro 1934 — La sama Departemento eldonis alian serion da ilustritaj poŝtkartoj (39) ankaŭ kun vortoj en la lingvoj portugala kaj internacia.

Aprilo 1934 — La 7-a Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro eldonis belegan ilustritan gvidlibron en Esperanto.

1 *Junio 1934* — La Departemento de Poŝto kaj Telegrafo komencis la uzadon de stampilo kun vortoj en Esperanto.

Aŭgusto 1934 — La poŝtagentejo de la 7-a Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro uzis stampilon kun vortoj en Esperanto.

Oktobero 1934 — La Unua Brazila Filatelieja Kongreso aprobis deziresprimon, per kiu estas rekomendita la uzado de Esperanto en la filateliejaj rondoj.

20 *Aprilo 1935* — Inaŭguro de la Esperanto-stando ĉe la "Montro de Turismo" organizita de la Urbestro de la Federacia Distrikto.

2 *Majo 1935* — La prezidanto de Brazila Ligo Esperantista faris en Esperanto, ĉe la Palaco de 1' Festoj, paroladon pri "Esperanto, lingvo de turismo"; tiu parolado estis disaŭdigita per mallongaj ondoj.

2 *Julio 1935* — La Departemento de Propagando kaj Kultura Disvastigo inaŭguris la disaŭdigojn de Esperantobultenoj ĉe la "Horo de Brazilo".

Augusto 1935 — Brazila Ligo Esperantista estis invitita de la urbestro de 1' Federacia Distrikto por teni reprezentantojn ĉe la Konsultaj Konsilantaroj de Turismo kaj de Foiro de Rio-de-Janeiro.

14 *Oktobero 1935* — Eldono de poŝtmarko memoriganta la 8-an Internacian Specimenan Foiro de Rio-de-Janeiro, kun vortoj en la portugala lingvo kaj Esperanto, laŭ ordono de d-ro Marques dos Reis, ministro de la Trafikaj Aferoj.

Inaŭguro de la Esperanto-stando ĉe la 8-a Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro.

Januaro 1936 — Publikigo de "Dicionário Português-Esperanto" (Portugala-Esperanta Vortaro), kun 506 paĝoj kaj 26.000 vortoj, presita ĉe la Ŝtata Presejo.

Publikigo de l' verko "O Rádio em 16 Palestras", tradukaĵo el la Esperanto-originalo "Fine mi komprenas la radion", de s-ro inĝ. E. Aisberg.

Februaro 1936 — La Regiona Estraro de l' Poŝto kaj Telegrafo de la Federacia Distrikto eldonis kartleterojn kun vidaĵoj el Rio-de-Janeiro kaj vortoj ankaŭ en Esperanto.

Majo 1936 — La Kongreso de Beletristikaj Akademioj kaj Societoj de Literatura Kulturo en Brazilo aprobis deziresprimon rekomendantan, ke la ŝtataj aŭtoritatoj presstifigu kaj helpu la tradukadon de l' plej bonaj brazilaj verkoj en la plej disvastigitajn lingvojn naciajn kaj ankaŭ en Esperanton.

29 Julio 1936 — S-ro d-ro Getulio Vargas, Prezidanto de la Respubliko, konsentis esti la alta patrono de la 9-a Brazila Kongreso de Esperanto.

8 Oktobro 1936 — S-ro d-ro Macedo Soares, Ministro por Eksterlandaj Aferoj, cedis la salonojn de paroladoj kaj de la Biblioteko de la Palaco de Itamarati (Ministrejo) por la kongresaj kunsidoj kaj eldonigis ĉe la Ŝtata Presejo ilustritan gvidlibron pri Rio-de-Janeiro.

30 Oktobro 1936 — La provizora Ministro de Publikaj Laboroj, prof. Licinio de Almeida, ordonis la eldonon de poŝtmarko memoriga de la 9^a Brazila Kongreso de Esperanto, kies ideon jam estis aprobita de la ministro mem d-ro Marques dos Reis.

13 Novembro 1936 — Apero de poŝtmarko memoriga de la 9^a Internacia Specimena Foiro de Rio-de-Janeiro kun vortoj en portugala lingvo kaj Esperanto.

Lembrança do 9º Congresso Brasileiro de Esperanto, realizado nos salões de conferências e da Biblioteca do Palácio de Itamarati, durante o mes de Novembro de 1936, sob o alto patrocínio do Ex. Sr. Dr. Getulio Vargas, Presidente da República, e presidência de honra dos Srs. Dr. Antonio Carlos de Andrada, Presidente da Câmara dos Deputados; Dr. Macedo Soares, Ministro das Relações Exteriores, Dr. Marques dos Reis, Ministro da Viação e Obras Públicas; Dr. Gustavo Capanema, Ministro da Educação, e Conego Olympio de Mello, Prefeito interino do Distrito Federal.

O ESPERANTO NO BRASIL

Fatos mais notáveis

15 Abril 1898 — Artigo sobre o Esperanto de Medeiros Albuquerque publicado na "Revista Brasileira".

Março 1904 — Aparecimento da tradução portuguesa da gramática "O Esperanto em 10 lições", do prof. Th. Cart, feita pelo Sr. A. Caetano Coutinho.

17 Março 1906 — Fundação do Grupo Esperantista "Suda Stelaro", em Campinas, Estado de S. Paulo, o primeiro fundado no Brasil.

21 Maio 1906 — Primeira lição de Esperanto dada pelo prof. E. Backheuser no jornal "O Paiz".

20 Junho 1906 — Fundação, no Rio-de-Janeiro, do "Brazila Klubo Esperanto", ainda existente, o mais ativo no Brasil

14 Novembro 1906 — O dr. Lauro Müller, ministro da Viação e Obras Públicas, mandou considerar o Esperanto linguagem clara para a correspondência telegráfica no interior do Brasil.

13 Julho 1907 — Abertura do 1º Congresso Brasileiro de Esperanto, cuja sessão inaugural foi presidida pelo dr. Tavares de Lyra, então Ministro do Interior.

21 Julho 1907 — Fundação da Liga Esperantista Brasileira.

Julho 1908 — O governo do Brasil pela primeira vez enviou um representante ao Congresso Universal de Esperanto.

Setembro 1908 — A Diretoria Geral de Estatística editou o Boletim Comemorativo da Exposição Nacional com os títulos em português, francês e Esperanto e aparte o prefácio em Esperanto.

Novembro 1908 — O Brazila Klubo "Esperanto" recebeu medalha de ouro pelo seu mostruário na Exposição Nacional

Agosto 1909. — O 4º Congresso Latino-Americano aprovou uma moção de simpatia ao Esperanto.

O 1º Congresso Brasileiro de Geografia aprovou uma moção de aplausos á propaganda do Esperanto.

5 Outubro 1913 — Inauguração da rua Esperanto em Realengo, no Distrito Federal.

29 Outubro 1913 — A Lei n. 1.162 permitiu o ensino facultativo do Esperanto nas escolas do Estado do Rio-de-Janeiro.

18 Setembro 1915 — O 4º Congresso de Geografia aprovou uma moção de simpatia ao Esperanto.

Setembro 1916 — O 5º Congresso de Geografia aprovou idéntica moção.

31 Outubro 1917 — Por decreto n. 1.165 foi dado á rua Maria José, no Rio-de-Janeiro, o nome de Zamenhof.

31 Outubro 1918. — A lei n. 759 permitiu o ensino facultativo do Esperanto na Escola Normal e nas escolas complementares do Estado de Sergipe.

11 Janeiro 1919. — O Decreto n. 2.083 permitiu o ensino facultativo do Esperanto nas escolas elementares, profissionais e Normal do Distrito Federal.

Setembro 1919. — O 6º Congresso de Geografia aprovou idéntica moção á aprovada no 4º congresso e também aconselhou a tradução para o Esperanto de obras de autores brasileiros.

10 Agosto 1921 — A Liga Esperantista Brasileira enviou á Liga das Nações um apêlo a favor do Esperanto assinado por mais de 200 pessoas eminentes com residência no Rio-de-Janeiro.

26 Outubro 1921. — Por decreto n. 4.356 foi a Liga Esperantista Brasileira considerada sociedade de utilidade pública.

31 Dezembro 1921 — O Parlamento Brasileiro concedeu uma subvenção anual á Liga.

4 Fevereiro 1922 — O Ministro da Viação recomendou aos diretores dos Correios e Telegráfos que enviassem ao presidente da Liga uma lista com os nomes e endereços de todos funcionários que já soubessem Esperanto, que o estivessem aprendendo ou que lhe fossem simpáticos.

Outubro 1922 — O 1º Congresso das Associações Comerciais do Brasil aprovou uma moção aconselhando o ensino do Esperanto nas escolas comerciais e o uso dessa lingua nas relações comerciais com as câmaras comerciais estrangeiras.

O 2º Congresso Americano de Expansão Econômica e Instrução Comercial aprovou uma moção demonstrando a necessidade de introduzir nos programas do ensino comercial dos países da America Latina o ensino do Esperanto.

28 Dezembro 1922 — A Câmara dos Deputados aprovou um projeto permitindo exame de Esperanto no Colégio Pedro II e em todos os estabelecimentos de ensino, onde se realizam exames de preparatórios.

Foi aprovado em primeira discussão na Camara Municipal um projeto de lei mandando considerar como uma das condições para a promoção ao magistério público o ensino, pelo menos durante um ano, da lingua Esperanto.

19 Abril 1923 — O Presidente da República enviou um delegado oficial á sessão inaugural do 7º Congresso Brasileiro de Esperanto, o qual foi presidido pelo Ministro do Interior.

Maió 1924 — O 1º Congresso Brasileiro de Contabilidade aprovou uma moção aconselhando a introdução do ensino do Esperanto nos cursos de comércio.

24 Março 1925. — O Esperanto foi incluído como matéria obrigatória no curso comercial da Associação dos Empregados no Comércio do Rio-de-Janeiro.

Novembro 1926 — O Governo Federal concedeu passagens gratuitas a todos os membros do 8º Congresso Brasileiro de Esperanto e o governo do Espírito Santo considerou-os como hóspedes do Estado.

Novembro 1928 — A 2ª Conferência Nacional de Educação aprovou uma moção favorável ao Esperanto.

30 Junho 1930 — Exibição no "Cinema Capitólio" do primeiro film falado em Esperanto.

17 Setembro 1930 — O 3º Congresso Sul-Americano de Turismo, reunido no Rio-de-Janeiro, recomendou a publicação também em Esperanto de guias de propaganda.

30 Janeiro 1932 — O Conselho Municipal de Aracajú deu a uma das ruas da cidade o nome de Esperanto.

Julho 1933 — O "Touring Club do Brasil" publicou um guia ilustrado sobre o Rio-de-Janeiro com algumas páginas em Esperanto.

A Sociedade de Geografia do Rio-de-Janeiro começou a publicar resumos em Esperanto dos artigos de seu Boletim.

Outubro 1933 — O Departamento dos Correios e Telégrafos editou uma série de 20 cartões-postais ilustrados com textos em português e Esperanto.

Fevereiro 1934 — O mesmo Departamento editou uma nova série de cartões-postais com dizeres em Esperanto.

Abril 1934 — A Feira Internacional de Amostras do Rio-de-Janeiro editou um bellissimo guia ilustrado em Esperanto

1 Junho 1934 — O Departamento dos Correios e Telégrafos começou a usar um carimbo com palavras em Esperanto.

Agosto 1934 — A agência dos correios da Feira Internacional de Amostras do Rio-de-Janeiro fez uso de um carimbo com dizeres em Esperanto

Outubro 1934 — O 1º Congresso Brasileiro de Filatelia aprovou uma moção recomendando o emprêgo do Esperanto pelos filatelistas.

20 Abril 1935 — Inauguração do "stand" do Esperanto na "Mostra de Turismo" organizada pela Prefeitura do Distrito Federal.

2 Maio 1935 — O presidente da Liga fez uma conferência em Esperanto sobre o Turismo no Palácio das Festas, a qual foi irradiada em ondas curtas.

2 Julho 1935 — Inauguração das irradiações em Esperanto na "Hora do Brasil" pelo Departamento de Propaganda e Difusão Cultural.

Agosto 1935 — O Sr. Prefeito do Distrito Federal convidou a Liga para designar representantes nos Conselhos Consultivos do Turismo e da Feira.

14 Outubro 1935 — Aparecimento do selo comemorativo da 8ª Feira Internacional de Amostras do Rio-de-Janeiro com texto em português e Esperanto, mandado editar pelo dr. Marques dos Reis, Ministro da Viação.

Inauguração do "stand" do Esperanto na 8ª Feira Internacional de Amostras do Rio-de-Janeiro.

Janeiro 1936 — Aparecimento do Dicionário Português-Esperanto, com 506 páginas e 26.000 verbetas, impresso na Imprensa Nacional.

Fevereiro 1936 — A diretoria regional dos Correios e Telégrafos do Distrito Federal editou cartas postais com vistas do Rio-de-Janeiro e dizeres também em Esperanto.

Maio 1936 — O Congresso das Academias de Letras e Sociedades de Cultura Literária no Brasil aprovou uma moção recomendando que os poderes públicos prestigiem e auxiliem a tradução das melhores obras para as línguas nacionais mais disseminadas e também para o Esperanto.

Janeiro 1936 — Aparecimento do livro "O Rádio em 16 Palestras", traduzido do original em Esperanto do Sr. E. Aisberg, editado pelos Irmãos Ponjetti.

29 Julho 1936 — O Exm^o. Sr. Dr. Getúlio Vargas, presidente da República, aceitou ser o alto patrono do 9^o Congresso Brasileiro de Esperanto.

8 Outubro 1936 — Sr. Dr. Macedo Soares, Ministro das Relações Exteriores, cedeu os salões de conferências e da Biblioteca do Palácio de Itamarati para as sessões do congresso e autorizou a publicação na Imprensa Nacional de um guia ilustrado do Rio-de-Janeiro.

30 Outubro 1936 — O prof. Licínio de Almeida, Ministro interino da Viação e Obras Públicas, autorizou a emissão de um selo comemorativo do 9^o Congresso Brasileiro de Esperanto, cuja ideia já fora aprovada pelo próprio ministro dr. Marques dos Reis.

13 Novembro 1936 — Aparecimento do selo comemorativo da 9^a Feira Internacional de Amostras do Rio-de-Janeiro com texto em português e Esperanto.